EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA
ilei
IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 51>** ● Belarto ● Novjaro ● Turismo ● Scienco **< sept. 17**

# Partoprenu en Belartaj Konkursoj

Rilate al la kvanto da konkursaĵoj ricevitaj pro la 73-a okazigo de la Belartaj Konkursoj (BK) en 2022, ilia nombro plenigas nin de ĝojo”, diras Miguel Gutiérrez Adúriz, Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA. “Temas ja pri la dua plej alta (173 verkoj) en la historio de BK ekde la jaro 1972, kiam tia donitaĵo komencis registriĝi. Se konsideri, ke pasintjare, kiam tiu nombro rekordis (186 verkoj), la limdato por sendo de konkursaĵoj por la 74-a sesio ricevis unumonatan prokraston.

“Alia fakto, kiu nin tre ĝojigas, estas tio, ke konkursanto jam partopreninta en aliaj okazigoj de BK fine ricevis la unuan premion en la celita branĉo. Aliaj, plurtalentaj, ricevis premiojn en diversaj branĉoj. Triaj provis esplori neniam ĝis tiam pritraktitan ĝenron kaj premiiĝis. Plie, nin aparte kontentigas la dinamikeco kaj tujeco konstatitaj rilate al muzikigo de kelkaj el la konkursaĵoj en la branĉo Kantoteksto, ne ĉiuj nepre ricevintaj la unuan premion”.

Miguel, krom esprimi la grandan ĝojon tiukaŭze spertitan de la gvida BK-skipo, alvokas ĉiujn beletramulojn kandidatigi verkojn al la 74-a okazigo de BK por eĉ superi la pasintjarajn rekordajn nombrojn da konkursaĵoj, partoprenante per altkvalitaj verkoj en BK-2023.

La rezultojn oni anoncos kadre de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio (plej favorpreze aliĝu ĝis la 31-a de decembro 2022: uk.esperanto.net/2023). Partopreno tamen estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

- **Poezio**: maksimuma longo ne fiksita.
- **Prozo**: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).
- **Mikronovelo**: (maks. longo 100 vortoj). La unua premio: *Premio Paula Adúriz*.
- **Teatraĵo**: maksimuma longo ne fiksita.
- **Teatraĵo,** subbranĉo **Monologo (unupersona aŭ Skeĉo). La premio:** *Premio María Cuevas*.
- **Eseo**: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio: *Premio Luigi Minnaja*.
- **Infanlibro de la Jaro**: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2022. Aljuĝata estas nur unu premio.
- **Kantoteksto**: maksimuma longo ne fiksita.

La limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31-a de marto 2023**.

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo ‘Infanlibro de la Jaro’ – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe *Miguel Gutiérrez Adúriz*, prefere retpoŝte al unu el la jenaj adresoj: belartajkonkursoj@gmail.com; aŭ bk@co.uea.org; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros 1-C, 2 Izda, ES-390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de *Miguel Gutiérrez Adúriz* kaj tri ekzemplerojn al *Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*, kun noto, ke temas pri kandidatigo de la libro al tiu ĉi branĉo.

**Premioj**: En la branĉoj *Poezio, Prozo, Teatraĵo* kaj *Eseo*: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la branĉoj *Mikronovelo* kaj *Kantoteksto*, kaj en la subbranĉo *Monologo aŭ Skeĉo*: unua premio 100 €, dua premio 50 €, tria premio 25 €. Cetere, la teksto ricevinta la unuan premion en la branĉo *Kantoteksto* estos muzikigita kaj la rezulta kanto estos diskonigita en ludado fare de kantisto aŭ kantogrupo.

Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de BK premiitaj en 2023 legeblos en la volumo *Belarta rikolto 2023*, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie esperanto.net/literaturo/bk/index.html. Estas rekomendate al interesatoj pri BK akiri kaj legi la *Belartajn Rikoltojn* (eldonataj ekde 2013) kaj aliajn verkojn BK-rilatajn.

# Novjara Invito en Germanio

9-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj 12-a Novjara Internacia Semajno (NIS) okazos de la 27-a de decembro 2022 ĝis la 3-a de januaro 2023 denove en Wiesbaden ĉe Rejno, 40 km okcidente de Frankfurto/Majno en la junulargastejo, en kiu ni jam dufoje agrable kunestis jarfine. Jen la informa paĝo http://esperanto.land/nr/#nr kaj la aliĝilo http://esperanto.land/nr/alighilo.shtml#alighilo

http://esperanto.land/nr/partoprenantoj_nr19_3.php

Dufoje ni jam provis okazigi la 19-an Novjaran Renkontiĝon, sed la kronviruso kaj la ŝtataj instancoj (kaj parto de la partoprenontoj) havis aliajn planojn... Ni esperas, ke ĉi-foje ni sukcesos laŭplane aranĝi la renkontiĝon.

# Pri la ekzamenoj

Trovu pliajn informojn pri la C2-nivelaj ekzamenoj:

https://edukado.net/novajhoj?id=877

En la Tutmonda Ekzamentago en novembro - eblas mendi sesion.

https://edukado.net/novajhoj?id=876

# Kurso en Beogrado

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso por komencantoj
Gvidantonomo: Živanko Novakov

Tipo: Nova movada kurso
Loko: Beogrado, Serbio
Aldoninto: arankal

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27441

# Kurso en Slovenio

la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Nomo: Kurso Slovenj Gradec
Gvidantonomo: Davorin Juraĉ
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Slovenj Gradec, Slovenio
Aldoninto: ostoj

# Kurso en Kjuŝu

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Enkonduka kurso
Gvidantonomo: Nitta Takamichi
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Kitakiuŝuo/Ŝimonoseki, Japanio
Aldoninto: superteksto

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27443

Ĉiuj tri eroj de Katalin Kovats

# Universitatanoj utile retkunsidis

La hodiaŭa kunveno pri agado en universitatoj estis pli sukcesa ol mi esperis. Ni havis bonajn raportojn pri tio, kio okazas en ĉinaj universitatoj fare de Longarko kaj Trezoro. Ni havis raporton pri la okazaĵoj en la afrika universitato en Barako, Kongo DR, kaj ni havis la viziton de komencanta profesoro el Seviljo kaj diskutojn pri kursoj en Esperanto en universitatoj. Cetere la situacio en la iranaj universitatoj de Teherano kaj Mazandarano daŭras sen problemoj kun retaj kursoj dum Ahmad verkas sian libregon en la persa pri la temo "Ĉu la angla aŭ Esperanto?" eldonotan de la universitato de Esfahano.

Renato Corsetti

Ne forgesu, ke tiu universitata grupo kunvenas ĉiumonate tra la reto. Skribu al Renato por esti allasita.

# Partoprenu en kunvenoj de Duolingo

**Duolingo** havas eblon, kiun malmulte da homoj konas: la **retajn kunvenojn**. *Se vi lernas* Esperanton per Duolingo kaj volas plibonigi vian kapablon paroli en la lingvo, profitu de tiu ĉi nova agado de UEA kaj TEJO: ni okazigos paroligajn renkontiĝojn per la sistemo de Duolingo, en kiuj vi povos partopreni ĉiusemajne kaj babili pri malsamaj temoj kun aliaj esperantistoj el diversaj landoj. *Se vi bone parolas* Esperanton, vin proponu por helpi kungvidi la babilkunsidojn en Duolingo.

La paroligaj kunsidoj daŭros 30 minutojn kaj okazos per ‘Zoom’. Vi povas kontroli la eblojn ĉe classes.duolingo.com. La nomo de niaj kunvenoj estas "Babilu kun amikemaj esperantistoj" kaj dum 10 sinsekvaj semajnoj estas planataj kunvenoj, kiuj komenciĝos la **12-an de septembro**. Ĉiuj, kiuj partoprenas en tia sesio, ricevas 250 poentojn per la sistemo de Duolingo! Aldone estas diversaj aliaj kunvenoj por lernantoj de Esperanto, kiel la lecionoj pri gramatiko gvidataj de Anna Lowenstein nome de la Londona Esperanto-klubo (tiuj okazas en la angla) kaj multaj aliaj. La lecionoj de la klubo ligiĝas al alia grava agado lanĉita ankaŭ ĉi-monate: la retaj Esperanto-kursoj por komencantoj (A1) ĝis (C1) progresintoj londonaesperantoklubo.c! om/Online EsperantoCourses.html.
Se vi jam parolas Esperanton flue kaj volas kunlabori kun la kunvenoj "Babilu kun amikemaj esperantistoj", kontaktu la komisiiton de UEA kaj TEJO pri tiu reta agado, Karina Oliveira, per la retadreso kgsoliveira@gmail.com aŭ per Telegramo (@librulino). La kunlaborantoj devos nur veni kaj respondeci dum 20 minutoj pri paroligo de la lernantoj en malgrandaj grupoj laŭ la rimedoj de Zoom. Karina zorgos pri ĉio teknike kaj enhave.

Se vi volas subteni la agadon pri membrovarbado de UEA kaj TEJO, vi bonvenas donaci al Fondaĵo Canuto: uea.org/alighoj/donacoj/canuto. Tio subtenos la aliĝon de komencantoj en UEA kaj TEJO.

# Kontribuu al Azio kaj Oceanio

Mi petas vian kontribuon por “Esperanto en Azio kaj Oceanio 115 (2022 oktobro)”. Bonvole sendu al mi, raportojn pri agadoj en via lando, urbo, asocio, societo aŭ klubo kaj informojn aŭ ideojn utilajn por agado aŭ lernado de Esperanto!
Vi mem aŭ iu el viaj kolegoj bonvole skribu kaj sendu al mi artikolojn ĝis la fino de septembro. Mi antaŭdankas pro via kunlaboro.

Permesu al mi peti vian aliĝon al la 109a Japana Esperanto-Kongreso; Hibride (rete kaj surloke), 23-25 Sept., Hachioji, Tokio.

Nisinaga Atusi (Acero / NIŜINAGA Acuŝi)
Prezidanto de Azia-Oceania Komisiono de UEA, acero@an.email.ne.jp

========= vortoj: 1370 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.